NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
esperantobilbao@terra.com
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 17 €. Speciala: 14 €. Familia: 30 €.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

MARTO/APRILO 2005 **Nro. 59 (2/05)**

NIA NOVA ESTRARO



Prezidanto: José L. Bringas



Vicprezidanto: Teodoro Ibáñez



Sekretario: Sabin Orueta



Kasistino: Iciar Arteche



Patxi de la Hoz



Iñaki Vélez



Jesús M. García

NOMUMO DE NOVA ESTRARO.

Laŭ estis anoncite, la 4an de marto okazis la ĉiujara ĝenerala kunveno de nia Asocio. Inter aliaj aferoj, oni nomumis novan estraron, kiu restas jene:

Prezidanto:	José Luis Bringas Tellechea	
Vicprezidanto:	Teodoro Ibáñez Martín	
Sekretario:	Sabin Orueta Mendia	
Kasistino:	Iciar Arteche Urrutia	
Voĉdonantoj:	Patxi de la Hoz Méndez	(*TTT-ejo kaj komputiko*)
	Iñaki Vélez Ortiz	(*Biblioteko kaj libroservo*)
	Jesús M. García Iturrioz	(*Nia Ponto*)

"FUNDACIÓN ESPERANTO" SUBTENAS LA KURSON EN LA UNIVERSITATO.

La Prezidanto de "Fundación Esperanto", **Toño del Barrio**, informis pri la decido subvencii, per 300,00 eŭroj, la E-kurson, kiun gvidas nia samideano Jesús M. García en la Instruista Altlernejo de la Vaska Universitato dum la lernojaro 2003/04. Per tiu mono, la E-Grupo de Bilbao povos senpage donaci instrumaterialojn al gelernantoj.

KOMENCO DE NOVA KURSO EN LA VASKA UNIVERSITATO.

La 14an de marto komencis nova E-kurso ĉe la Vaska Universitato, jam la 5an jaron. Al ĝi aliĝis 15 gelernatoj kaj, kiel kutime, temas pri libervole elektebla studobjekto kun valoro de 4,5 kreditoj, tio estas, 45 horoj. Nia samideano **Jesús M. García** estas denove la gvidanto.

ELEMENTA KURSO EN NIA SIDEJO.

Nia amiko Patxi de la Hoz daŭrigas la instruadon al gelernantoj, kiuj komencis lerni Esperanton en oktobro. Ĉe la fino de la kurso, oni planas ree preni tiun tradicion meti verdajn stelojn sur la brustojn de la novbakitaj esperantistoj, kiel bonveno al Esperantio.

FORPASIS ...



Kun granda bedaŭro alvenis novaĵo pri forpaso de nia amiko **Luis Mª Amézaga Asensio**. Ankoraŭ juna, ĉar 52-jara, ĝis antaŭ nemulte ĉeestis regule niajn kunvenojn kaj kursojn. Tre scivola pri diversaj lingvoj, li parolis kelkajn kaj multe interesiĝis pri esperantologio. En nia memoro restos liaj potenca voĉo kaj granda afableco. Ke li pace ripozu.

VENONTAJ E-ARANĜOJ.

02/09 jul.	Zagreb (Kroatio). 78a SAT-Kongreso.
07/10 jul.	Alcalá de Henares. Kongreso de Hispana E-Federacio (HEF)
23/30 julio.	Vilno (Litovio). 90a Universala Kongreso de UEA.
30 jul/05 aŭg.	Kaunas (Litovio). 38a Konferenco de ILEI.
31 jul/07 aŭg.	Zakopane (Polio). 61a Internacia Junulara Kongreso (IJK)

... kaj multaj aliaj, pri kiuj vi povas trovi informojn inter la revuoj, kiuj kuŝas en nia klubejo.

COBRO DE CUOTAS 2005.

En los próximos días pasaremos al cobro, por la BBK, los recibos de socio correspondientes al año 2005.

Aquellos que aun no tenéis domiciliado el pago, en caso de queráis que sea así, no tenéis mas que darnos un número de cuenta (a ser posible, en la BBK). Si no, podéis hacer ya el ingreso de la cuota en la cuenta que figura en la primera página de esta circular.

NE FORGESU ...

Ke ni kunvenas ĉiun vendredon, de la 19,30 ĝis la 21,00 h., en la sidejo de la E-Grupo. En la sama tago, de la 19,00 ĝis la 20,30 h., disvolviĝis elementa kurso, gvidata de Patxi de la Hoz, kiu jam finiĝis.

Vi ĉiuj estas invitataj partopreni tiujn kunvenojn, kiujn ofte ĉeestas la gelernantoj de la nova kurso.

NOVAĴOJ PRENITAJ EL LA RETO.

Azia kongreso prokrastita pro puĉo.

La kvara Azia Esperanto-Kongreso, kiu devis okazi de la 4-a ĝis la 8-a de marto en Nepalo estas prokrastita ĝis aŭgusto pro la nestabila politika situacio en la lando. Komence de februaro reĝo Gyanendra eksigis la demokratian registaron kaj igis sin mem estro de la registaro. Jam aŭtune eŭropanoj kiuj planis partopreni la Azian kongreson esprimis dubojn pri la sekureco en Nepalo, sed la organizantoj de la kongreso asertis ke estas neniuj problemoj. *Raportis: Kalle KniivilÃ¤ <kalle@esperanto.se>. 10/02/2005. "NUN"*

PRELEGO PRI ESPERANTO EN UNIVERSITATA FAKULTATO.

La pasinta 11-an de februaro, en la fakultato pri Tradukado de Soria (Hispanio), apartenanta al la Universitato de Valladolid, kadre de la libervola doktoriga kurso pri Esperanto kaj tradukado, gvidata de D-ro Juan Zarandona, prelegis D.rino Urueña, profesorino pri Internacia Juro en la Valadolida universitato pri la temo Kontribuo de Esperanto al la lingva diverseco. La gelernantoj sekvis tre atente la prelegon kaj je la fino faris plurajn kaj interesajn demandojn
Raportis: Luis HernÃ¡ndez <LUISHERNANDEZG@usuarios.retecal.es.> 13/02/2005. "NUN"

NE HASTU: EN ITALIO ONI MALFRUAS.

91a Universala Kongreso. Firenze, 29/07-5/08/2006. Kial hasti, se vi intencas viziti landon kie ĉio malfruas? Ne zorgu pri aliĝilo kaj antaŭpago, verŝajne la unua estas fuŝa kaj la dua perdiĝos! Kial entute partopreni kongreson kie, vi jam povas esti certa, buso por la ekskurso alvenos post horo kaj duono kaj vi devos atendi drinkante kafon en Piazza del Duomo sub la florenca Katedralo? Kial restadi tie, kie la homoj ankoraŭ tiom zorgas pri tradicioj, kvalito de manĝo, historio? Tie, kie suno kaj mara salo riskas sekigi vian haŭton? Ne hezitu: restu hejme! Dante Alighieri.
Raportis: Francesco Amerio <f.amerio@libero.it> 18/02/2005. "NUN"

Esperanto en hispana universitato.

La Universitato de La Laguna ofertas la jam sepjaraĝan liberelektan seminarion por la universitataj studentaro kadre de la Fakultato pri Filologio (Lingvistiko) ' Enkonduko al Esperanto kaj al sia kulturo'; temas ne nur pri la instruado de la lingvo, sed ankaŭ pri la historio kaj kulturo de Esperanto kaj pri aliaj planitaj lingvoj (interlingvistiko). Sume 30-h. La direktoro kaj inicianto de la kurso estas la Prof. Alejandro Lopez de Vergara Méndez, profesoro de Filologio en la Universitato. Ĝi komenciĝis la 1an de marto kaj estos 30-hora. Kun atestilo post sukcesa, libervola ekzameno aŭ mallonga tezo por akiri poentojn. La profesoro Alejandro López de Vergara reprenis la laboron de Juan Régulo Pérez en la Universitato kaj ekde 1999 pli ol 150 gelernantoj sekvis la kurson (ĉiuj jaroj pli ol 30). Por pliaj informoj : http://webpages.ull.es/users/aflopez/esperanto/index.htm
Raportis: LUNO <plenluno@yahoo.es> 22/02/2005. "NUN".

REKLAMO EN "EL PAÍS".

Hodiaŭ en El Pais aperas politikan anoncon ene de la plej multekostaj paĝoj de la ĵurnalo. Ĝi traktas pri voĉdoni nee al la eŭropa konstitucio kaj ĝi aperas Esperante kaj hispane. Ĝi estas publikigita de partio nomata "Cultura Natural" kaj ili sin difinas "*Partio anarkista modera **ekologa kaj naturista" ¿? *. Ilia retpagxo estas www.culturanatural.org, sed la paĝo estas preskaŭ malplena kaj ĝi ŝajnas esti farita por ĉi tiu anonco, ĝi ne havas enhavaĵojn. Ŝajnas al mi tro da mono por asocio mi neniam priaŭdis, eble ia religia sekto?
Toni Cebrián (prenita el diskutejo de SATEH). 18/02/2005.

Korespondantoj.

Ĉu vi jam vizitis http://www.esperantomondo.net ? esperantomondo.net estas TTTejo kiu utilas rilatigi personojn, kiuj serĉas korespondantojn tra la tuta mond'. Eblas serĉi, uzi babilejon, ... Ĝi ankaŭ utilas konigi esperanton kaj esperantajn renkontiĝojn. http://www.esperantomondo.net jam havas pli ol 700 homojn de pli ol 60 diversajn landojn !
Raportis: sebeto <maxmanseb2@aol.com> 19/02/2005. "NUN".

Nova NOVAĴSERVO.

La Pola Sekcio de ILEI funkciigis interretan Novaĵservon, kies celo estas RAPORTI pri agado propra, partoprenata aŭ ĉeestata, studenta k.a., - PERADI al la polaj instruistoj, studentoj GRAVAJN INFORMOJN el la tuta mondo pri inspiropova agado kaj pri la prestiĝo de Esperanto. Por la polaj ILEI-membroj funkcias ankaŭ Retmesaĝa kaj SMS-a Novaĵservo. Ni esperas, ke la novaĵoj estos por vi interesaj kaj inspirigaj. Maria Majerczak sekciestrino.
Raportis: Novaĵservo de Pola Sekcio de ILEI <piotr.esp@gmail.com> 23/02/2005. "NUN".

Esperanto en Eŭropa Parlamento.

La 7-an kaj la 8-an de dec. 2004, en Eŭropa Parlamento en Bruselo okazis konferenco pri laikeco kaj religio en Eŭropa Unio, tradukata en 5 lingvojn, interalie en Esperanton. La konferencon oni povis sekvi ankaŭ pere de Interreto, en la lingvoj: franca, angla, itala, hispana kaj Esperanto. http://www.radicalparty.org/welcome2.html
Raportis: Novajxservo de Pola Sekcio de ILEI <piotr.esp@gmail.com> 23/02/2005. "NUN".

Institucia rekono por UK Florenco 2006.

La itala Ministerio por kulturaj havaĵoj kaj agadoj donis sian patronecon por la 91a UK de Esperanto, kiu okazos en Florenco de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2006. Gravas rimarki, ke tia ministeria patroneco estas donata nur al iniciatoj kun rimarkindaj naciaj kaj internaciaj reliefo, intereso kaj signifo. La ministerio por kulturaj havaĵoj kaj agadoj estas la unua itala ŝtata institucio, kiu donas sian patronecon al la venontjara UK. La LKK petis la altan patronecon ankaŭ de la Prezidanto de la Respubliko.
<uk2006.informoj@esperanto.it>
Raportis: Francesco Amerio <f.amerio@libero.it> 23/02/2005. "NUN".

64a Hispana Kongreso de Esperanto.

De la 7a ĝis la 10a de julio okazos en Alcalá de Henares (naskiĝurbo de Cervantes) la 64a HEK. La programo konsistos el prelegoj, hispane kaj esperante, pri diversaj temoj inter ili, prelego de Jorge Camacho pri Influo de Fernando de Diego en la originala E-Beletro kaj aliaj prelegoj rilatantaj al D. Kiĥoto kaj Sanĉo Panza. Dum la Kongreso oni vizitos la Muzeo-Domo de Cervantes kaj estos donacita ekzempleron de la esperanta versio tradukita de Fernando de Diego. Ankaŭ estos ekspozicio de infandesegnoj pri la temo "Tiel mi vidas Don Kiĥoton".
Raportis: Luis HernÃ¡ndez <LUISHERNANDEZG@usuarios.retecal.es> 24/02/2005. "NUN".

Post Esperanto, EU-konstitucio ankaŭ en la romaa.

La hispanaj romaoj povos legi la EU-konstitucion en sia propra lingvo, almenaŭ ties artikolojn pri rajtoj kaj liberecoj - raportas la portalo http://www.romnet.hu , kie daŭre aperas novaĵoj en Esperanto pri la vivo de romaoj precipe hungariaj. Klaku sur la lingvo-elektan butonon 'Esperante'. *Raportis: IstvÃ¡n Ertl <ertl@tiscali.be> 01/03/2005. "NUN".*

Eŭropaj aktivuloj ne scias kion peti de EU.

La unua esperantisto en la Eŭropa Parlamento, Malgorzata Handzlik, ricevadas amasojn da leteroj de esperantistoj kiuj volas ke ŝi antaŭenigu Esperanton. Tamen ĉiu havas sian propran ideon pri tio, kion ŝi faru. La aktivuloj de Eŭropa Esperanto-Unio volus ke oni fondu novan interpartian grupon en la parlamento, sed ne klaras, kion la grupo faru. La diskuto inter la aktivuloj ĝis nun temis ĉefe pri la nomo de la eventuala nova grupo. 'Malfacilas proponi aliĝon al intergrupo, kiu havas precizigitan nomon sed ne la celojn', diras Malgorzata Handzlik mem.
Raportis: Kalle KniivilÃ¤ <kalle@esperanto.se> 01/03/2005. "NUN".

64a Hispana Kongreso de Esperanto.

La retpaĝo pri la 64a Hispana Kongreso de Esperanto, okazonta de la 7a ĝis la 10a Julio 2005 en Alcalá de Henares (proksime al Madrido) troveblas en:
www.esperanto-es.net/congreso2005/
Raportis: Dario Rodriguez <dariorodri@wanadoo.es> 07/03/2005. "NUN".

UEA ne ricevos Nobel-premion en 2005

En 1988 Universala Esperanto-Asocio preskaŭ ricevis la Nobel-premion pri paco. Por la ĉi-jara premio estis proponita rekorda nombro de kandidatoj, entute 199. Tamen inter tiuj 199 ne plu estas UEA, kiu antaŭe dum multaj jardekoj regule estis kandidatigata por tiu prestiĝa premio. William Auld aliflanke denove estas kandidatigata por la literatura Nobel-premio. *Raportis: Kalle KniivilÃ¤ <kalle@esperanto.se> 20/03/2005. "NUN".*

IOM DA HISTORIO ...

PREZIDANTOJ DE LA E-GRUPO DE BILBAO

20/05/1906.- TEODORO ELIZONDO CALERA
20/01/1907.- JUAN ZAVALA
29/12/1907.- VICTOR OLEGARIO DE ALLENDE Y ZAVALA
27/12/1908.- JOSE VELASCO
02/01/1910.- RICARDO JAUREN
15/01/1911.- JOSE VELASCO
05/01/1913.- JULIO LIZARRA
15/06/1913.- ALFREDO SARALEGUI
06/01/1914.- JUAN JOSE LARREA
17/07/1915.- FELIX DIEZ MATEO
31/12/1922.- JUAN JOSE LARREA
01/02/1925.- JUAN GRACIA COLAS (Konsilanto pri Socia Vaska Asistado,1937)
10/01/1926.- PEDRO DE ICAZA Y GANGOITI
16/01/1927.- MANUEL DE ELEZCANO Y MAIZTEGUI

.....
.....Mankas Protokollibro .....
.....

01/10/1932.- ALBERTO DÍAZ CHAPARTEGUI

.....
.....Mankas Protokollibro..... .
.....

03/05/1953.- EUGENIO LUNATE PEREZ
20/02/1955.- LUIS DE OTAOLA Y FAÓN
21/06/1959.- JOSE EULOGIO IRANZO FERNANDEZ
07/04/1963.- LUIS DE OTAOLA Y FAÓN
04/05/1969.- JULIO J. JUANES SAINZ
27/04/1971.- RAMON DE IZAGUIRRE DE LA FUENTE
08/04/1975.- JOSÉ LUIS BRINGAS TELLECHEA
17/05/1979.- EDUARDO LARROUY LÓPEZ
09/07/1981. TOMÁS APRAIZ RIBERAS
31/05/1985.- SANTIAGO MARTÍN RELEA
12/03/1987.- JESÚS MIGUEL GARCÍA ITURRIOZ
10/03/1990.- JOSÉ LUIS BRINGAS TELLECHEA
12/03/1991.- TEODULO SÁNCHEZ PÉREZ
08/03/1993.- Estrarkomitato, al kiu apartenis:
IÑAKI VÉLEZ ORTIZ – KETI SESMERO CUTANDA
DAVID MEDIAVILLA EZQUIBELA–JOSÉ Mª SARASÚA FERNÁNDEZ
14/03/1995.- ANDER AGUILAR SAN MILLÁN
16/05/1997.- IÑAKI VÉLEZ ORTIZ
30/04/1999.- IGONE MANCILES MARÍN
02/03/2001.- JOSÉ Mª SARASÚA FERNÁNDEZ
07/03/2003.- JESÚS MIGUEL GARCÍA ITURRIOZ
04/03/2005.- JOSE LUIS BRINGAS TELLECHEA.

NIAJ AKTIVULOJ ...



ELIZONDO CALERA, Teodoro (1882-1967)

(Unua Prezidanto de la E-Grupo de Bilbao)

Bankoficisto, laŭ propraj vortoj, li "kontaktis kun Esperanto en Bilbao, en la jaro 1905", kiam "amiko mia diris al mi, ke li kun aliaj amikoj decidis lerni Esperanton. (...) malgraŭ ke ili jam sciis, ke mi ne konis eĉ unu vorton de tiu lingvo, ĉar ili pensis ke la lernado de Esperanto estus facila al mi, tial ke mi jam konis tri lingvojn. Do, mi promesis al ili lerni ĉiutage unu lecionon kaj sekvantan tagon klarigi ĝin al ili. Tiu estis unu el la faktoroj kiu instigis min lerni la lingvon. Krom tio mi ĉiam estis partiano de unu lingvo internacia".

La 20an de majo 1906, kiam estis fondita la E-Grupo de Bilbao, li estis elektita unua prezidanto de nia asocio.

En 1909 ĉeestis la Internacian Kongreson de Esperanto en Barcelona (la unua internacia kongreso okazinta en Hispanio), kie li havis la ĝojon kaj honoron koni persone D-ron Zamenhof kaj saluti lin.

En la sama jaro –1909a– komenciĝis en Bilbao la publikigo de la revuo *NOVA SENTO*, kaj ĝia korektado estis unu el liaj taskoj. Tiu revuo meritis la specialan atenton de Dro. Zamenhof kiu gratulis per poŝtkarto –nun konservita kiel relikvon– ĉiujn kiuj partoprenis la redaktadon kaj aperigon de tiu revuo. Sro. Elizondo ankaŭ havis oftan korespondadon kun la mondkonata pioniro E. Privat jam forpasinta.

Samtempe, Ofte, li gvidis kursojn por parolantoj de la lingvoj kastilia kaj eŭska, kiujn li tre bone regis.

Post la hispana intercivitana milito, li denove reaktivis en la Movado kaj estis Vicprezidanto de la Esperantista Grupo de Bilbao en 1953. Alie, li estis membro de la Hispana Instituto de Esperanto (1926a), kaj verkis la ŝlosilon Esperanto-Eŭska, ("*Esperanto-Giltza*").

(*El "Analoj de la Esperanta Movado en Hispanujo" de A. Marco Botella. Zaragoza 1987 kaj el "Boletín". Jan/feb 1965*)

2006 !!!

LA E-GRUPO DE BILBAO 100-JARIĜOS